# La historio de la kripo



**Estis la antaŭtago de Kristnasko en Greccio* en la jaro 1223. Francisko estis malkvieta. En Assisi oni ne multe parolis pri Jesuo.**





***(Prononco Greĉĉio) - Italujo**




La homoj estis zorgoplenaj por pretigi dolĉaĵojn kaj bonan vinon.

Ili ne havis tempon por preĝi kaj mediti.

Francisko estis pli kaj pli kosternita kaj komencis maltrankviliĝi.

Li pensis:

“ Kiel oni povas forgesi la veran kristnaskan signifon?”



**Francisko pensis:** **“Devas esti maniero por memorigi al la popolo, ke la vera Kristnaska signifo estas Jesuo”**










**Legante en la evangelio la priskribon de la sankta nokto de Bet-Leĥem, la sceno aperis antaŭ liaj okuloj kiel en pentraĵo.**








Venis al li inspiro kaj
li tuj komprenis, kion li
volis fari.
Krome li havis amikon,
kiu povis helpi lin.




Lia amiko havis kelkajn
ŝafojn, azeneton kaj
bovinon.





**Francisko petis de sia amiko ke li alportu la bestojn kaj jom da pajlo ĉe la flanko de la monteto kie troviĝas groto…..**











**Tuj la bestoj**

**komprenis kion havis**

**en la kapo**

**Francisko.**






La azeneto

memoris ke estis

ĝuste unu kiel li…,





….kiu transportis

Marian kaj Jozefon

al

Bet-Leĥem .






**La bovino**

**muĝis kaj**

**kapjesis …**






**….finfine estis ĝuste**


**bovino, kiu donis sian**


**liton al Jesuo.**












**La ŝafoj kortuŝiĝis me-**
**morante pri la**
**kareso de Jesuo,**
**bona paŝtisto,**
**kiu multe amis ilin .**




**Finfine Francisko sendis al la urbanoj ĉi tiun mesaĝon:**










**La popolo**

**fariĝis**

**scivolema ……**





Kaj tiel la
loĝantoj,
forlasinte siajn
festojn, enviciĝis
kaj sin
demandis:

“Kiu scias,
kian trezoron
ni trovos!?”



Alvenintaj ĉe la enirejo de la groto, ili larĝe malfermis mire la okulojn: ene estis bestoj alvenintaj el ĉiu flanko kaj bela infaneto kuŝis sur la pajlo.







La luno plenumis sian promeson kaj eligis sian luman radion sur la pajlon de la kripo ……Ĉiuj voĉoj kvietiĝis dum la popolo amasiĝis sur la flanko de la monteto.



La steloj en la ĉielo neniam estis tiel brilaj krom en tiu unua Sankta Nokto.



**Francisko diris:**

**“Ĉi tiu estas la trezoro**

**sendita de la ĉielo”.**





**Poste Francisko**

**aldonis:**

**“Kiam vi foriros,**

**memoru ke nur Jesuo**

**povas plenigi viajn**

**malplenajn korojn”.**





**Kaj Francisko diris :**

## "Pacon kaj bonon

## al ĉiuj en ĉi tiu

## Sankta Nokto".



**La originalo en la itala estas legebla ĉi tie:**

**http://www.graficapastorale.it**

**Esperantigo de T.Fossati**

**http://www.ueci.it/porinfanoj/**

**Ne reproduktu profitcele**